# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 08/02/2024 sescentsepdektria eldono (unua eldono 26/09/2011)



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)



## Esperanta Retradio




DONAS BONAN CIRKAU-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

PERFEKTA KAPTILO POR KARBONDIOKSIDO

1a de februaro 2024 (*Roger Springer*)

## Melburno-Esperanto Asocio ĉe *Ross House*

La venontan lundon (5an de februaro) ni rekomencas niajn kunvenojn ĉe Ross House. Bedaŭrinde ni ne plu povas kunveni ĉe la teretaĝo. Ni nun kunvenas ĉe la 2a etaĝo. Detaloj por eniri la konstruaĵon estos senditajn al la membroj.



Ni sendas bondizirojn al ĉiuj legantoj de AE por 2024. *Heather Heldzingen*




**En Aŭstralio la ĉefministro sole decidas pri militaj aferoj.**
**Ĉu malebligi helpon al Gazianoj estas milita afero?**
**Ĉi tio bezonas referendumon.**

*Roger Springer*

# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 3a de Febuaro estis la unua sabato.

Venis Roger, John, kaj Ian 02 9976 6320 *Roger Springer*

# Prelego: La historio de la Esperanto-movado

D-ro L. L. Zamenhof evoluigis la internacian lingvon Esperanto en la 1870-aj kaj 80-aj jaroj kaj publikigis la unuan libron pri ĝi en 1887. Ekde tiam la nombro de Esperanto-parolantoj iom post iom kreskis, kvankam ĝi ne havis multe da subteno de registaroj kaj internaciaj organizaĵoj kaj foje estis malpermesita aŭ alie subpremita.

En ĉi tiu kunveno ni prezentos la historion kaj evoluon de Esperanto, de ĝia lanĉo ĝis la deklaro de la germana urbo Herzberg am Harz kiel la unua "Esperanto-urbo" en la mondo.

Dum la paŭzo estos senpagaj kafo, teo kaj Esperanto-muziko.

La prelegisto Rainer Kurz estas la eksprezidanto de Germana Esperanto-Asocio kiu nuntempe vizitas Aŭstralion. Li komence lernis Esperanton dum 20 horoj ĝis li faris sian unuan Esperantan vojaĝon (al Japanio). Intertempe li uzis Esperanton por vojaĝi al pli ol 40 landoj.



Tempo: Merkredo 14a de Februaro 2024, 15:00 - 17:00

Loko: Esperantodomo, 143 Lawson Street, Sidnejo/Aŭstralio Ĝis baldaŭ *Rainer Kurz*

Registrado: https://www.meetup.com/de-DE/esperanto-in-sydney/events/298903910

Kara Roger,

mi vidas en AE 672 la du bildojn, kiuj komparas la grandecon de la komercaj partneroj Usono kaj Ĉinujo en la jaroj 2000 kaj 2020.

Rilate al ambaŭ ŝtatoj oni povas demandi sin, ĉu "partnero" estas la ĝusta vorto. Kiam ni parolas pri partneroj, mi imagas proksimume samrajtajn partiojn. Tio ja validas nek por Usono nek por Ĉinujo. Superregado estis kaj estas la rilato inter tiuj du grandpotencoj unuflanke kaj la "partneroj" aliflanke.



Krome mi havas fortajn dubojn, ĉu estas speciale saĝe anstataŭi unu dependecon per alia. Amike, *Peter Weide*

**3ZZZ** En la elsendo de la 5a de februaro 2024 troviĝas pli da informoj pri la Universala Kongreso en Aruŝo, opinio pri la influo de Artefarita Intelekto al la lernado de lingvoj, aparte Esperanto, rimarkoj pri la aspekto de akvo kaj pri la graveco de familia nomo.



Ni pardonpetas pro la teknika malbona kvalito je la komenco de tiu elsendo kaj de la antaŭa. Laŭ la manaĝero de la radio 3ZZZ la teknikisto korektis la eraron, do espereble ĉio estos en ordo venontan semajnon *Franciska Toubale*